# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Bob Felby**

**PLENUMITA 21/07/2022 Kvincentnaŭdekdua eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ http://thesaker.is/

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro* *lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *esperanta retradio* *Plena Analiza Gramatiko*


*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj" korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 705,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas 299,000 lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas 163,000 lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas 145,000 lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

Nun studas 98,000 lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )

## Surhavu vizaĝmaskon.

*Roger Springer*



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.** Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondas pri via sano, do portu maskojn.

Aŭstralio ĵus komencis akcepti la ĉinan *yuan* anstataŭ US dolarojn por nomitaj karbaj kontraktoj al la Popola Respubliko de Ĉinujo. La monda mono sistemo ŝajngas. *Roger S*



# la esperanta retradio



Donas bonan ĉirkau-5 minutan auskultadon kaj legadon ĉiun tagon. 18a julio 2022

Jam iomete da alkoholo malrapidigas pensadon



# La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo kunvenas je 10.30 atm ĝis 12ptm la unuan kaj trian sabaton de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.
Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Whitewater, Suda Stejno.
La 16a de Julio estis la tria sabato. Venis kvar ! Roger, Chris, John kaj Ian *Roger Springer*.

## Old Way, New Way | The Vineyard of the Saker

**Ĉio rilatas al energio.** Ne kun teknologio—tio estas hazarda; ne kun armea supereco - tio estas pasema kaj plejparte imaga; certe ne kun ia politika aŭ kultura memjusteco—tio estas delira. **Ne ekzistas anstataŭaĵo por energio.** Se vi malaltiĝas, vi ne povas ŝanĝi vian industrian ekonomion sur fioloj. Ĝi simple fermiĝas. Kio estas pli malbona, energifontoj eĉ ne estas precipe anstataŭeblaj unu por la alia. Se mankas al vi gaso, vi ne povas simple ŝanĝi al karbo aŭ al seka sterko, eĉ se vi estas ĝis via kolo en ĝi. Moderna industrio funkcias per petrolo, tergaso kaj karbo, en tiu sinsekvo, kaj ili povas esti anstataŭigitaj unu la alian laŭ tre limigitaj manieroj. Krome, energio devas esti tre malmultekosta. Oleo devas esti proksimume la plej malmultekosta likvaĵo, kiun vi povas aĉeti—pli malmultekosta ol lakto; pli malmultekosta eĉ ol enboteligita akvo. Se energio ne estas sufiĉe malmultekosta, tiam la tuta energimalsata industrio, kiu funkcias per ĝi, fariĝas neprofita kaj fermiĝas. Tio estas la stadio ĉe kiu ni nun estas en granda parto de la mondo. Do, kio okazos?

Parto de bona artikolo el Old Way, New Way | The Vineyard of the Saker *Roger Springer*





Butikumante iun tagon Eileen falis kaj rompis sian brakon. Malgranda grupo da homoj kolektiĝis ĉirkaŭ ŝi diskutante kiel plej bone helpi ŝin, sed, ĉar ŝi estas sperta pri "unua helpo", ŝi scias ja, ke oni devas per longa tuko sekurigi la brakon al la flanko de la korpo.

Eileen do petis unu el la apudstarantoj, ĉu li bonvolos eniri apudan vendejon kaj aĉeti por ŝi longan tukon. La apudstaranto eksilentis kaj iu viro sin klinis al ŝi kaj ĝentile diris: "Ne maltrankviliĝu, vi povos fini vian butikumadon iom poste!"

*Bob Felby*



**Malnova foto de Linda Danzer kaj Doug Eising ĉe *Roma Parkland***

Tie Brizbana Esperanto-societo ree celebros Esperantan Tagon
ĉe la julia kunveno je 12-a horo. Ĉiujn bonvenotajn

*Petro Danzar*

**La Brizbana Esperanto Societo** kutime kunvenas la kvarajn dimanĉojn ĉiumonate je la 10:30h, " Brisbane Square Library, Adelaide St." VISITANTOJ ESTAS BONVENAJ

# ESPERANTO UTILAS EN ĈINUJO

Kiam mi serĉis la Interreton por informo pri "novaj materialoj" mi rimarkis interesan aferon. La unuaj kvar trafoj estis por Vikipedio, TEJO, kaj Libera folio. Tiam sekvis ok retejoj de diversaj firmaoj en Ĉinujo: "Esplorado kaj Disvolviĝo de Metala Ŝaŭmo", "italaj sportaj faciligaj materialoj", "Qingdao Vinner Novaj Materialoj Co., Ltd.", "(Ŝanhajo) Internacia Konstrua Izolado, Ekstera Muro de Novaj Materialoj", "Zesheng novaj materialoj teknologio co., Ltd". ktp. Unu retejo ebligas al la uzanto elekti inter 36 lingvoj por legi la informon.

La lingvaĵo de iuj retejoj estis sufiĉe bona, ekzemple "Aluminia ŝaŭmo havas multajn aplikojn en konstruaĵoj, kaj konstrui eksplod-rezistajn materialojn estas unu el ĝiaj gravaj uzoj." Tamen iuj aliaj evidente estas maŝine tradukitaj kaj ne kontrolitaj de esperantisto, ekzemple "Sed ankaŭ Kiel rekoni specon de muro? Por rekoni vian speco de muro, ĝi estas tre simpla ! Vi nur devas aŭskulti la sonon, kiun ĝi elsendas. Se la Muro resonas, tiam estas la Muro kava. Se ĝi ne resonas, tiam la Muro estas plena."

Ĉu vi volas komerci en Esperanto? Do serĉu partneron en alia lando. *Donald Rogers*





Kara Amiko Bob

Mi kore gratulas vin pro via 90-a naskiĝtago!

Mi deziras al vi la benon de nia Kara Dio por saneco,

ĝojo kaj „saĝa, klara menso“.

Li donacu vin per multaj pliaj, feliĉaj jaroj sur nia bela tero.

Kore salutas sian karan mentoron,

el Germanujo

Hermann